

FRANKLIN DELANO ROOSEVELT

En la jaro 1613 navigis sur brigo en vilaĝon Nova Amsterdamo, kiun antaŭ kelkaj jaroj fondis Nederlandanoj ĉe enfluejo de rivero Hudson, nederlanda komercisto Claes Martenszen van Roosevelt. Li ekloĝis tie kaj fariĝis civitano de urbo, kiun Angloj, kiuj la vilaĝon konkeris de Nederlandanoj, alinomis Nov-Jorko. Baldaŭ li edziĝis kaj kiel bona kalvinisto havis multajn infanojn. Filoj edziĝis al filinoj de anglaj enmigrintoj, la familio post nelonge angliĝis. Rooseveltidaj baldaŭ fariĝis apartenantoj de amerika aristokrataro. En generacio estis multaj rodistoj kaj komercistoj, kiuj komercis kun la okcidenta Hindio, Eŭropo kaj Ĉinio; bienposedantoj, kiuj akiris bienojn en enlando, politikistoj kaj juĝistoj.

Unu el Rooseveltoj estis ano de la Kongreso, kiu deklaris apartigon de la reĝa Anglio kaj fondon de sendependaj Unuiĝintaj ŝtatoj. Pluaj estis ministroj kaj vic-ministroj en diversaj vaŝingtonaj registaroj.

Poste la generacio dividiĝis je du grandaj branĉoj. Unu aĉetis bienojn sur bordo de Ojstra Golfo (Oyster Bay), sur Long Island, la dua ĉirkaŭ Hyde Park, norde de Nov-Jorko. En la unua estis ĉiuj pro tradicio partianoj de respubliko kaj el ĝi devenis prezidento Theodor Roosevelt. En la dua – tradicie demokrata – naskiĝis estonta prezidento Franklin Delano Roosevelt.

James Roosevelt, kiu heredis bienon post la patro kaj bredis tie brutaron kaj konkurs-ĉevalojn, estis samtempe ano de administra estraro de kelkaj fervojaj kompanioj. Kiam li havis 48 jarojn, mortis al li edzino. Kvar jarojn poste, en la jaro 1880 konatiĝis en loĝejo de sia malproksima kuzo, de la estonta prezidento Theodor Roosevelt, – malgraŭ diferenca politika aparteneco kaj komerca rivaleco ambaŭ branĉoj de la generacio societe interrilatis – kun la 26-jara Sara Delano, ankaŭ malproksima parenino. Li edziĝis al ŝi spite grandan aĝan diferencon. Post du jaroj el la feliĉa geedzeco naskiĝis la 30-an de januaro 1882 filo Franklin.

La maljuna patro kaj la juna patrino amegis la solinfanon. La knabo lernis ĉevalrajdi, kuradis en arbaroj, ŝipveturis sur la patra jaĥto. Li rilatis kun infanoj el najbaraj bienulaj familioj, inter kiuj estis ankaŭ milionulaj familioj Astor kaj Vanderbilt. Parton de somero li pasigis en vilao Campobello apud kanada landlimo. Preskaŭ ĉiun jaron ili veturis en Eŭropon, Anglion, Francion, Germanion kaj Italion. Kiel decis je aristokrata familio, la gepatroj eĉ ne ideeton havis sendi la infanon en vilaĝan lernejon, kien iradis infanoj de geservistaro kaj de farmistoj. La knabon edukadis guvernistinoj, antaŭ ĉio instruis al Franklin lingvojn, la germanan kaj francan. La patro kaj patrino lernigis lin legi kaj skribi, fiksitis ĉe li fundamentojn de matematiko kaj fundamentajn sciojn el geografio kaj el la eŭropa historio.

Nur kiam havis Franklin 14 jarojn kaj ne estis plu eble izoli la sanan infanon de la ĉirkaŭa mondo, decidiĝis GeRooseveltoj sendi la filon en lernejon. Sed ankaŭ tiam ili elektis por li aristokratan lernejon. En Groton proksime al Boston fondis internulan knaban lernejon bona familia konato, presbiteriana pastro Endicott Peabody, en kiun sendadis siajn knabojn la plej riĉaj kaj plej aristokrataj familioj de Usono. Inter anoj de la lerneja konsilantaro estis inter aliaj John Pierpont Morgan, la kapo de la plej granda bank-domo sur Wall Street. En ĉi tiu lernejo pasigis Franklin kvar jarojn. Li estis bona lernanto, bona sportulo kaj sporton en ĉi tiuj lernejoj oni konsideris same grava kiel bonan prosperon, li estis bona kamarado – sed neniel li superis mezon.

En sia dekoka jaro li finstudis Groton-lernejon kaj volis studi la maristan militan akademion. Sed la patro lin persvadis, ke li iru studi la juristan fakultaton de Harvard-universitato. Du monatojn poste lia patro mortis.

Ankaŭ en la supera lernejo la juna Roosevelt aparte ne eminentis. Li havis intereson pri sporto, vizitadis prelegojn, submetiĝis al ekzamenoj kun meza prospero, montris intereson pri ĵurnalismo kaj fariĝis kunlaboranto kaj pli poste unu el redaktoroj de studenta gazeto "The Harvard Crimson". Kiam li finstudis en Harvard, daŭrigis Franklin Roosevelt studojn en jurista fakultato en Nov Jorko. Li studis tie du jarojn. Ĉe la finaj ekzamenoj li malsukcesis, tamen estis al li permesita jurista praktiko, tiel ke li povis fariĝi advokato ĉe la jurista firmo Carter, Ledyard a Milburn en Nov Jorko.

Li estis 25-jara, kiam li akceptis postenon. En la jaro 1905 li edziĝis al sia malproksima parenino Eleanor Roosevelt. Kiel atestanton ili havis ĉe la geedziĝo la plej faman viron de Usono,

prezidenton Theodor Roosevelt, onklon de la fianĉino.

La advokata praktiko la junan juriston ne tro amuzis. La firmo, ĉe kiu li laboris, estis jura reprezentanto de grandaj bankoj kaj industriaj koncernoj. Li okupiĝis pri havaĵ-procesoj, pri konfliktoj rezultantaj el borsaj spekuladoj, pri pledo de monopoloj akuzitaj pro atencado de kontraŭtrusta leĝo. Dank' al sia fama nomo havis Roosevelt ĉe siaj mastroj relativan liberecon kaj ne devis pasigi multe de tempo en oficejo aŭ en tribunalo. Pli multe lin amuzis la heredita bienego. Unuafoje li vidigis la intereson pri politiko nur en la jaro 1910. Tiam li havis 28 jarojn. Kaj li estis por la politika vivo je amerikaj cirkonstancoj bone preparita.

Li konis bone politikajn rilatojn en la lando, li estis konvinkita defendanto de la amerika vivmaniero, pasia partiano de la amerika demokratio. Li estis fiera pri amerika historio, kiu lin tre intertesis kaj ellernis arton debati kun politilaj rivaloj. Li estis konvinkita pri tio, ke la usona politika reĝimo estas la plej bona en la mondo, sed ankaŭ pri tio, ke ĝi povas kaj devas perfektigadi, ke la usona demokratio kaj sistemo de privata entreprenado garantias al la usona popolo plej bonajn eblojn por plua evoluo, sed ke li kaj homoj el lia klaso havas preskaŭ de Dio donitan taskon ĉi tiun popolon al tia evoluo konduki. En Harvard li interkonatiĝis kun la pragmata filozofio, kio lin preparis al iom pli liberala rilato al tradicioj, kiujn estas necese respekti, sed kiujn oni povas ankaŭ ŝanĝi.

Kaj poste tie estis por la juna viro granda modelo: lia propra, ne rekta onklo Theodor Roosevelt, karakteriza personeco de usona politiko kaj dum la juneco de Franklin prezidento de Usono. Ĉi tiu viro havis en si aron da kontraŭoj: Je unu flanko tio estis Theodor Roosevelt, kiu per sia agresema eksterlanda politiko finis transiron de Usono en la imperiisman periodon, kaj je alia flanko li estis tiu, kiu en la nomo de batalo kontraŭ grandaj bankoj kaj trustoj, en la nomo de neeviteblaj reformoj de usona kapitalismo ne hezitis rompi la respublikanan partion, fondi progreseman partion, apoganta sin je la farmistoj de meza okcidento kaj parte de inteligentularo kaj tiel senigis la respublikanan partion je potenco. Imperiisto, demagogo kaj progreseculo – tia estas en unu persono la fama parenco de Franklin. Li havis grandan partoprenon je provoko de milito kontraŭ Hispanio, kiu finiĝis per anekso de Filipinoj kaj Puerto Rico al usonaj kolonioj kaj de Kubo kiel de duonkolonio. Li organizis "revolucion" en Kolumbio, kiam ĉi tiu lando rifuzis permesi al potenca nord-amerika najbaro konstruadon de kanalo inter Atlantiko kaj Pacifiko, li fondis marionetan "memstaran" respublikon Panamon, kiu volonte parafis kun li kontrakton pri konstruado de la kanalo kaj pri usonaj esceptaj rajtoj en la kanal-zono. Sed je la alia flanko komencis prezidento Theodor Roosevelt periodon, kiu nesufiĉe, sed tamen nur klopodis limigadi povon de monopoloj. Kaj estis Theodor Roosevelt, kiu akceptigis en Usono, konstruita sur nelimigita individualismo de fortaj entreprenemaj unuopuloj, almenaŭ ĝerموjn de sociala leĝaro – protekton de virinoj kaj infanoj, limigon de labor-tago kaj simile.

Theodor Roosevelt estis elektita por respublikanoj kiel vicprezidanto en la jaro 1900, kaj kiam estis la prezidento Mac Kinley murdita de atenculo, li fariĝis en la jaro 1901 prezidento kaj estis denove elektita en la jaro 1904. Post foriro el la Blanka Domo li forveturis kun granda reklamo ĉasi rabobestojn en Afriko kaj post la reveno li eklaboris en ĵurnalismo kaj skribado de historiaj romanoj. En la jaro 1912 li aspiris renove pri la respublikana kandidateco, kaj kiam lin respublikanoj kiel homon tro progreseman kaj malamikan al trustoj rifuzis, li fondis propran progreseman partion, en la elektoj li akiris pli da voĉoj ol la respublikana konservativa kandidato Taft, kaj videbligis tiel elekton de demokratia prezidento Wilson. Estas kompreneble, ke tiel fama parenco kiun la juna Roosevelt povis vizitadi en la Blanka Domo kaj kiu estis al li kiel atestanto ĉe la edziĝo, fariĝis lia modelo, malgraŭ tio, ke li estis respublikana, dum Rooseveltoj el Hyde Park estis tradicie demokratoj. Tial ankaŭ ŝtupetoj de la politika kariero – ano de ŝtata parlamento en Nov-Jorko, vicministro de milita ŝiparo, Nov-Jorka guberniestro, kandidato je vicprezidento kaj poste prezidento, kiu en kolizio kontraŭ la tradicio provis pri elekto la trian fojon — estis ĉe Franklin la samaj kiel ĉe Theodor.

La dua homo, kiu Franklinon treege influis, estis lia edzino Eleanor. Ŝia patro, frato de Theodor, malsana homo kaj notora alkoholulo, kiu la filinon tenere amis, baldaŭ mortis. La patrino ne tro zorgis pri ŝi kaj la junan nebelan knabinon edukadis la onkloj, kiuj neniam forgesis riproĉi

al ŝi ŝian patron - nigran ŝafon de la familio. La infanaĝon kaj junecon ŝi travivis en diversaj internulaj lernejoj. Siajn kompleksojn de minuseco kompensis per severa morala ordo, kiun al si mem ŝi difinis kaj kiu ordonis al ŝi inici la vivon al laboro por la malfortaj, subpremataj kaj persekutataj. Estis ĝenerala surprizo, kiel por familio, tiel por societo, ke ĝuste al ĉi tiu junulino enamiĝis kaj poste edziĝis al ŝi la junulo aminda, bela kaj sana viro, de gaja kaj eble iom facilanima karaktero, kiun krome atendis granda kariero.

Ĝi estis feliĉa geedzeco, en kiu la ambaŭ paruloj kompletigis kaj reciproke influis unu la alian. Eleanor, tre multleginta, art-amantino, homo kun profunda demokratia konvinko, kiu preskaŭ kun religia fervoro konsideri je sia misio laboron por homoj kaj al tio, kiel poste montriĝis, talenta ĵurnalistino kaj kapabla politika observantino, havis grandan meriton je tio, ke Franklin Roosevelt transprenis de sia fama antaŭulo kaj parenco tiujn plej bonajn ecojn – lian sencon por reformoj, lian antaŭjuĝemon kontraŭ trustoj – kaj ke li ne fariĝis sekvanto de lia agresema imperiismo.

En la jaro 1910, kiam juna Franklin Delano Roosevelt, kiun la advokata praktikado ĝeni, pasigis pliparton da tempo en naskiĝbiendomo en Hyde Park, estis jaro, kiam Usono vivis en atendado de grandaj ŝanĝoj. Respublikanoj regis jam tro longe. Prezidento William Howard Taft apartenis al plej dekstruma alo de la respublikana partio kaj peza industrio kaj bankoj ĝuis plej grandan favoron de la registaro. Altaj dogan-barieroj elvokis malkontenton de farmistoj, kiuj devis pagi altajn prezojn por industriaj produktoj, defendataj antaŭ fremda konkurenco. Korupto ekhavis tiajn formojn,

ke tuta generacio de publicistoj specialiĝis al malkovrado de skandaloj, en kiuj estis implikitaj funkciuloj do ambaŭ politikaj partioj kaj la publika opinio postulis intervenon de la registaro kontraŭ la koruptemaj politikistoj. Estis klare, ke post du jaroj, kiam venos la prezidenta balotado, la partio de respublikanoj malkoncentriĝos pro frakciaj bataloj, kaj demokratoj, por kiuj ekestos ilia okazo, mobilizis fortojn kaj serĉis konvenajn kandidatojn.

Tiam demokratoj en Dutschess Couhty, kie situas Hyde Park, rememoris la junan Roosevelt. Li ne estis ja tre konata kaj ankaŭ en la partio, al iu li apartenis pli el respekto al la mortinta patro ol el konvinko, ne estis aktiva. Sed ĝuste tial, ĉar li estis juna kaj ankoraŭ ne sperta, li havis pli bonajn ŝancojn ol maljunaj kompromititaj politikistoj. Krome, li estis riĉa, li povis pagi balotkampanjon, sed ankoraŭ pro dankemo pro tiu ĉi honoro povis kontribui al baplotkarapanjo de aliaj kandidatoj. Kaj krome li estis Roosevelt, danke al Theodor Roosevelt, nomo en Ameriko tre populara. Oni proponis al Franklin, ke li kandidatu en ŝtata parlamento por la demokratia partio en Dutschess County. La patrino volis lin deturni de tio, ĉar ŝi ne opiniis politikon metio konvena por vera aristokrato. La edzino, tiam la trian fojon graveda, estis pri tio indiferenta. Sed Franklin estis konvinkita, ke en politiko li multe sukcesos. Ne vane lernejo en Grotono ĉefe emfazis gvidkapablojn, arton debati, ne vane rektoro Peabody inokulis al siaj lernantoj konvinkon, ke morala devo de homoj, kiuj dank' de sia origino kaj posedaĵo staras frunte de la socio, estas ankoraŭ destinitaj la socion gvidi. Kaj krome estis tie ekzemplo de la alia Roosevelt, kiu ĉi tiun decidon aprobis, eĉ se temis pri ano de alia partio.

Post kelkaj tagoj montriĝas, ke lia kandidateco en ŝtatan parlamenton ne estas libera, ĉar ĝin aspiras ĝisnuna parlamentano, sed vakiĝis kandidateco en ŝtatan senaton. Tiel Roosevelt komencis balotkampanjon. La balotkampanjo estas organizata tiel, ke kandidato devas veni en personan kontakton kun kiel eble plej granda nombro da balotantoj, ke li prezentiĝu al ili kaj konvinku ilin pri siaj kapabloj. Precipe en la kamparo. Ĝis nun oni faris tion tiamaniere, ke kandidato en kabrioleteto trenata per ĉevaloj traveturadis balot-distrikton, haltis en unuopaj farmoj, vizitis plej eminentajn civitanojn en malgrandaj urboj, premis la manojn, karesis infanojn, babilis kun balotantoj, kiujn li klopodis alparoli per baptonomo, parolis en malgrandaj kunvenoj de diversaj kluboj aŭ en pli grandaj balot-kunvenoj. La juna Roosevelt tuj dekomence agis renverse, kontraste al la ĝisnunaj kutimoj.

Aŭtomobiloj estis ankaŭ en Ameriko tiam raraj, sed Franklin dungisen Nov-Jorko aŭton, kiun li dekoris per standardoj kaj balot-transparentoj kaj li veturis al siaj balotantoj. Li havis grandan devancon antaŭ sia respublikana kunkuranto, ĉar li estis pli rapida. Ĝia veturilo, eĉ se ĝi timigis la farmistajn ĉevalojn, elvokis ĉie atenton, la kandidato povis komenci siajn balot-kunvenojn

per interparolo pri avantaĝoj de motorismo, pri signifo de motoroj en agrokulturado. Sed li parolis ankaŭ pri aliaj aferoj. Li agitadis kontraŭ altaj doganoj, kontraŭ alta procento. Li parolis ankaŭ kontraŭ korupto kaj apelaciis al plej parencaj rilatoj kun granda Roosevelt, kiu same batalis kontraŭ korupto.

Sed ĝuste urba organizaĵo de demokrata partio en Nov-Jorko en la tuta Ameriko estis konata pro plej malbona korupto. Demokrata klubo Tammany Hall diktatoris la tutan urban organizaĵon kaj en la klubo regis kelkaj bossoj, plejparte de Ira origino. Stariĝi kontraŭ bossoj el la propra partio postulis kuraĝon. Kaj ĉi tiu kuraĝo alportis al Franklin Roosevelt sukceson. En sia balot-agitado li apelaciis kiel al membroj kaj balotontoj de la propra partio, tiel al respublikanoj kaj senpartianoj. Li venkis kontraŭkandidaton el la respublika partio, sed liaj deklaroj kontraŭ propraj klubanoj ne restis sekretigitaj. Kiam li spertis la unuan fojon en Albany, en ĉefurbo de ŝtato, kie li luis grandan loĝejon por la tuta familio kaj venis en senaton, sidis en antaŭsalono unu el bossoj de Tammany Hall Tim Sullivan, nomata Big Tim. Kiam estis Sullivan atentigita je la nova senatano kun nazumo surnaze kaj en longa redingoto, murmuris, ke li aspektas kiel protestanta paroĥestro. "Li estas ankoraŭ hundido," grumblis boss de koruptuloj, "sed ĉi tiuj Rooseveltoj povas esti danĝeraj. Tiajn hundidojn estas plej bone dronigi, antaŭ ol ili elkreskos kaj komencos mordi."

La unua ago de la juna senatano estis deklari al bossoj batalon. En tiu tempo estis federaciaj senatanoj – membroj de la supera kamero de Amerika Kongreso – balotataj en ŝtataj parlamentoj. Ŝtataj parlamentoj, regataj de subaĉetebraj aparatoj de politikaj partioj, elektis kutime homojn, kiuj povis bone pagi aŭ estis kandidatoj de trustoj. Ŝtataj parlamento kaj senato en Nov-Jorko havis demokratian majoritaton. Tio signifis, ke decido pri kandidateco de estonta senatano, estis en manoj de bossoj el Tammany Hall. Kaj ĉi tiuj destinis kiel kandidaton iun Sheehan el urbo Buffalo, reakciulo kaj milionulo, kiu riĉiĝis helpe de vet-oficejoj. Kontraŭ ĉi tiu decido oponis Franklin Roosevelt kaj kunvenigis ĉirkaŭ si kelkajn pluajn demokratajn politikistojn. Ribeluloj deklaris, ke ili ne elektos Sheehan kaj sen iliaj voĉoj demokratoj ne havis en ŝtata parlamento plimulton.

La batalo daŭris kelkajn monatojn kaj vekis atenton malproksime post landlimo de Nov-Jorko. En tiu tempo la Amerika Kongreso pritraktis proponon de balot-reformo, kiu ebligis elekton de senatanoj per ĝenerala voĉdono kaj la reakciaj personoj en ambaŭ partioj kontraŭ tio furioze sin defendis. Tial la batalo de demokrataj ribelantoj kontraŭ Tammany Hall akiris karakteron de tutamerika problemo. En la respublika partio estis gvidanto de progresema alo Theodor Roosevelt, iama prezidento, kaj viro, kiu denove en venontaj prezident-balotoj en jaro 1912 volis aspiri la prezidentan oficon. Nun aperis ankaŭ en demokratia partio Roosevelt, kiu stariĝis frunte de la progresema alo. Tio estis temo por artikoloj en gazetoj de orienta ĝis okcidenta bordo.

La afeso finiĝis per kompromiso. Sheehan devis rezigni pri kandidateco kaj ambaŭ partioj interkonsentiĝis pri alia kandidato, kiu ne estis tiel konata pro korupto. Por juna Roosevelt signifis la tuta afero tre multe. Li atentigis je si kiel politikisto, kiu transkreskis lokan nov-jorkan medion kaj li ankaŭ ellernis metion de parlamenta politiko, traktado kaj kompromisoj, arton batali kontraŭ atakoj kaj intrigoj de rivaloj. Li alianciĝis kun kelkaj aliaj demokrataj politikistoj el Nov-Jorko, kiuj pli poste ludis en lia vivo grandan rolon, ekzemple Robert P. Wagner kaj Alfred E. Smith. Ankoraŭ kelkfoje, dum du jaroj, kiujn Roosevelt pasigis en Albany, li ekbatalis kontraŭ bossoj el Tammany Hall. Li akceptigadis leĝon pri mallongigo de labor-tempo por junaj laboruloj je 54 horoj semajne kaj leĝon pri kompensoj por labor-vundiĝoj. Tie estis por li unua okazo, almenaŭ iomete konatiĝi kun la alia parto de la amerika industria evoluo, mizeron kaj maljustaĵon, kiuj estis destino de amerika laborularo. Li proponis en kunlaboro kun aliaj senatanoj leĝon pri antaŭ balotoj, kiu devus malebligi tion, ke kandidatoj en publikaj oficoj ne estus difinitaj per korupteblaj korifeoj kaj ordonis, ke ili estus elektataj en sekret-balotoj per ĉiuj registritaj partianoj. Li akceptigadis leĝon pri disponigo de balot-raĵto al virinoj. Li batalis por ŝtata kontrolo de arbar-ekonomio kontraŭ rezisto de ligno-koncernoj, por subvencioj al lakto-kooperativoj, por ŝtata kontrolo de grenkomercistoj, por akva ekonomio, kiu respektus interesojn de malgrandaj farmistoj.

En jaro 1912 okazis denove balotoj por senato. Roosevelt tiam malsaniĝis je tifo, kaj la tutan kampanjon anstataŭ li gvidis lia amiko: ĵurnalisto Louis Howe, kun kiu li amikiĝis en Albany. Li kondukis ĝin tiel sukcese, ke Roosevelt estis ne nur denove elektita en nov-jorkan senaton, en kiu li

fariĝis prezidanto de agrokultura komitato, sed li gajnis pli da voĉoj, ol li akceptis en lia rajono demokratiaj kandidatoj je oficoj de prezidento kaj guberniestro. En jaro 1912 la demokratia partio venkis en ĝeneral-balotoj, tial prezidento fariĝis demokrata guberniestro de ŝtato Nov-Jorko Woodrov Wilson, kaj unuafoje post longaj jaroj akiris demokratoj majoritaton en ambaŭ parlamentoj de la Kongreso.

Skismo inter respublikanoj garantiis al demokratoj facilan venkon, sed des pli obstinega estis batalo pri elekto de kandidato en demokratia kongreso en junio 1912 en Baltimore. Se fine estis Wilson elektita kiel kandidato, li dankemis por tio ĝuste al Roosevelt. Tial neniel surprizis, ke la nova ministro por milita ŝiparo Josephus Daniels, demokratia politikisto el Sudo kaj amiko de Wilson, proponis Roosevelt postenon de la unua vicministro en sia oficejo. Roosevelt ĝoje akceptis. Unue ĉar li povis tie akceptigi sian malnovan intereson pri la mara navigado, due ĉar temis pri grava kaj signifa posteno en la centrala registaro. Mar-oficiroj estis komence malkonfidaj al politikisto, kiu neniam deĵoris de maristaro kaj nun fariĝis ilia estro. Sed Roosevelt baldaŭ ilin inklinigis al si, ĉar li fariĝis ilia parolanto, defendis iliajn postulojn kaj evoluis grandan energion, ke Usono konstruu fortan militan ŝiparon. Tio memkompreneble ne estis simpla, ĉar la tradicia eksterlanda politiko de Usono estis izolado kaj neŭtraleco.

Tial Franklin Roosevelt venis en oftajn konfliktojn ne nur kontraŭ la Kongresoj kaj preso, sed ankaŭ kun la registaro, antaŭ ĉio kun sia ĉefo, kiu ne havis grandan komprenon por postuloj de admiraloj. Kiu volis konstrui militan ŝiparon, necese venis en servojn de imperiisma politiko, ĉar la ŝiparo kaj mara infanterio estis ĝuste instrumentoj de imperiismaj konkeroj de Usono. Kiam la usona registaro surprizis-atakis Meksikion, por subpremi la meksikan revolucion, estis tio ĝuste la usona milita flotilo, bombardinta la meksikan bordregionon, mar-infanterio, kiu elŝipiĝis en Santa Cruz kaj vicprezidanto de ministro por milita ŝiparo, Franklin Delano Roosevelt, kiu havis grandan meriton pri sukcesado de ĉi tiu operacio. Ĝuste tial en Dominika respubliko kaj sur Haiti, sur Kubo kaj sur ĉeno de mar-bazoj de la Teksasa golfo ĝis brazilia bordo.

Pri usona partopreno en milito decidis mar-blokado de Anglio. Usonaj ŝipoj transportantaj en Anglion nutraĵojn, krudaĵojn kaj armilojn, rifuzis subiĝi al la germana mar-blokado. Germanaj subakvaj ŝipoj alfundigis ankaŭ usonajn ŝipojn. En aprilo 1917 Wilson proklamis militon al Germanio. Antaŭiris tion granda kontraŭgermana propaganda kampanjo, kiu preparis la usonan publikan opinion je ĉi tiu paŝo.

Kiam Germanio kapitulacis kaj Wilson forveturis al Versailla paca konferenco, estis Roosevelt kun sia edzino en lia sekvantaro. Sed ŝajnas, ke en la konferenco li ne tro aktivis. Por tio li havis nek spertojn, nek okupis en usona delegacio sufiĉe gravan pozicion. Sendube li ludis iun taskon ĉe organizado de la usona interveno kontraŭ la rusa revolucio en Siberio, kvankam neniam el la amerikaj Roosevelt-biografoj ĉi tiun aferon mencias. Male pri ĉi tiu afero konserviĝas rimarkinda silentado.

En jaro 1920 demokratoj malvenkis kaj respublikanoj por pluaj 12 jaroj ekokupis la regadon. Franklin Delano Roosevelt foriris en privatecon. En tiu tempo ne eblas paroli pri liaj firmaj politikaj aŭ mondkonceptaj principoj. Li karakteriziĝis per persona honesteco, li havis siajn moralajn principojn pli vere hereditajn ol konscie atingitajn, malpurigis manojn nek per politikaj mahinacioj, nek per korupto, li akiris eĉ reputacion de homo laŭ la usonaj cirkonstancoj progresema. Sed nenio atestis, ke en decidaj krizaj momentoj de la usona mond-historio li troviĝos en centro de potenco kaj ke sur ĉi tiu posteno pruvos siajn astrajn kapablojn de gvidanto kaj sinceran demokratian konvinkon.

Venko de opozicia partio signifas en Usono ŝanĝon de la tuta ŝtata aparato, escepte de fakulaj. Tial Franklin Roosevelt devis serĉi al si alian okupon. Tio ne estis malfacila. Roosevelt fariĝis vicprezidanto de bank-domo, kiuj spekulis en borso. Li entreprenis diversajn spekuladojn kaj investojn. Li partoprenis an firmo, kiu akaparis senvalorajn germanajn markojn, por tiel ekposedi akciojn de germanaj industriaj entreprenoj; li partoprenis en firmo, kiu organizis languskaptadon kaj la konservadon. Grandan feliĉon en ĉi tiuj spekuloj li ne havis. En iuj firmoj, kie li partoprenis, li iom profitis, en aliaj perdis, tiel ke lia ĉefa enspezo rezultis el vicprezidanta posteno en la bankdomo. Sed la sorto ne donis al li tro multe da tempo por la komercado. Tre baldaŭ en aŭgusto

1921 alvenis nome al katastrofo.

En sia somera restadejo sur kanada insuleto Campabello li malsaniĝis kaj vilaga kuracisto konstatis, ke tio estas kutima malvarmumo. Dua kuracisto konstatis difektiĝon de spino. Nur post du semajnoj konstatis specialisto alvokita el Nov Jorko, ke temas pri terurega malsano – poliomjelito –, infana paralizo. Kuracistoj estis konvinkitaj, ke kun politiko aŭ komerca kariero estas fino. Delikate ili konvinkadis la malsanulon, ke li restos ĝis morto invalido, kiu ne povos sin movi sen fremda helpo. Unusola, kiu tion rifuzis kredi, kiam jam la familio, geamikoj kaj la publiko, instruitaj per preso pri procedo de malsano de la konata politikisto, jam paciĝis kun ĉi tiu penso, estis la paciento mem. Lia denaska optimismo, grandega vivenergio kaj firma volo venkis super diagnozo de kuracistoj.

San-higiena kaj psika krizo, kiu daŭris dum kelkaj jaroj, havis grandegan signifon por Roosevelt-evoluo. Antaŭ ĉio ĝi instiruis lin paciencon kaj persistemon, ebligis al li eduki fortan volon, enplantis al li konscion, ke ĉiujn malhelpojn oni povas venki. Ĉar ĝi lin por kelkaj jaroj tute eliminis el la publika vivo, li havis multe da tempo por la penado kaj legado. Li trastudis multajn librojn, antaŭ ĉio biografiojn kaj historiajn verkojn, tralegis amasegon da vojaĝpriskriboj kaj detektivromanojn. Malsano pliprofundigis lian demokratian konvinkon. Li ellernis kompreni, kio estas la homa suferado kaj pro kompreno de fizika doloro li maturiĝis al komprenado de suferado sociala. Profunde li konsciiĝis, ke nomo kaj havaĵo ne estas la ĉefa en la vivo de homo, kiel kredis plejparto de liaj samtempuloj kaj samlandanoj. Li fariĝis humanisto, li ŝanĝiĝis el mezkvalita usona politikisto kaj vicprezidanto de bank-domo en grandan demokratian diplomaton.

En la plej krizaj momentoj li havis grandegan helpon en Eleanor, kiu neniam rezignis la kredon, ke Franklin povos reveni en la aktivan politikan vivon. Skriba kontakto kun demokrataj politikistoj en tuta Usono, konservado de kontaktoj, kiujn li ligis en balot-kampanjo en jaro 1920, ne ĉesis ankaŭ en la tempo, kiam li estis katenita sur liton. Eleanor Roosevelt fariĝis lia ĉefa helpanto por kontakto kun la publiko. Ĉar li sola nur malfacile moviĝis, ŝi anstataŭis lin, kie ŝi nur povis. Ŝi ĵetiĝis en aktivan publikan agadon, vojaĝis tra la tuta lando, partoprenis laboron en centoj da organizaĵoj, paroladis en kunvenoj, informadis publicistojn, skribis artikolojn por ĵurnaloj, ĉirkaŭis sin per junularo, sindikatanoj, negraj klerikuloj kaj intelektuloj kaj post reveno hejmen pasigis longajn horojn per tio, ke al la edzo ŝi rakontis, kion ŝi vidis kaj travivis, kun kiu ŝi parolis, kion ŝi aŭdis. Ŝi enportadis en ĉi tiujn vivajn kontaktojn kun la usona popolo la tutan pezon de sia profunda demokratia konvinko kaj peradis al Roosevelt opiniojn kaj konsiderojn de la popolo. Ŝi fariĝis neoficiala, sed tial des pli ŝatata Roosevelt-anstataŭulo kaj ankaŭ plej proksima celtabulo de atakoj de reakcio kontraŭ la demokrata politikisto.

Prezidenta balotado en la jaro 1924, kiui okazis denove sub signo de "eterna prospero", fariĝis denove afero de respublikana partio. Roosevelt estis delegito en kongreso de demokratia partio en Nov Jorko kaj lia ekiro atentigis tutan Usonon, ke la peza malsano ĉi tiun viron ne venkis. Egale tiel en la balot-kampanjo en jaro 1928 vivis demokratia partio denove kun minimumaj esperoj je sukceso. Nov Jorka guberniestro en ĉi tiuj balotoj estis elektita Franklin Delano Roosevelt, kies sanstato en tiu tempo ŝanĝiĝis tiamezure, ke li ree komencis okupiĝi pri gravegaj politikaj planoj.

Plej granda katastrofo de la usona ekonomio, kiu montriĝis post bankroto sur borso en Wall Street la 21-an de oktobro 1929 kaj profunda ekonomia krizo, kiu sin ŝanĝis en profundan krizon de la tuta usona socio, kreis en balotoj en la jaro 1932 por demokratia partio novan okazon. Ĝi bezonis kandidaton, kiu ekirus kun kuraĝo kaj progresema programo kapabla allogi voĉdonantojn. Tia kandidato estis Nov Jorka guberniestro, ĉar li sciis en sia ŝtato akceptigi iujn progresemajn aranĝojn, ĉar li estis politikisto, kiun konis la tuta lando, ĉar li reprezentis ĉion sanan, kio estis en la demokrata partio.

Kiel kandidato je prezidenta ofico li ekiris kun konsterniga kritiko de la usona ekonomia sistemo kaj ĵuris, ke li instalos "novan sorton" (New Deal) por la usona popolo. En la balotado akiris Roosevelt grandan plimulton kaj vortoj "New Deal" fariĝis simbolo de lia regado. Nova, sed ankoraŭ ne oficiala prezidento alvojaĝis la 15-an de februaro 1933 al Miami sur Florido. En publika kunveno, kie li estis parolonta, amasiĝis pli ol 100.000 homoj. Roosevelt estis bonvenigata per

ĝojkrioj de popolamaso. Antaŭ ol li ekparolis, aŭdiĝis pafo. Anarkiisto de itala deveno Zangara volis pafmortigi la novan prezidenton, sed virino, kiu staris en la homamaso apude, rimarkis, kiel li pafcelis el revolvero kaj ektiris lian manon. La kuglo preteriris kaj trafis ĉikagan urbestron Ĉermák, kiu post transporto en malsanulejon mortis.

En tagoj antaŭ la inaŭgura soleno atingis la ekonomia krizo plej profundan punkton. Okazis bankrotoj de kelkaj bankoj. Konsternitaj ŝparuloj ĵetis sin al giĉetoj, por enkasigi siajn ŝparaĵojn. Ĉar bankoj ne havis sufiĉe da kontanto, la giĉetoj estis fermitaj kaj elpago de ŝparaĵoj rifuzata. Komenciĝis terura paniko, unu banko post la alia anoncis bankroton, en aro da ŝtatoj estis bankoj fermitaj post interveno de guberniestro.

La 4-an de marto 1933 faris Roosevelt la prezidentan ĵuron kaj prezentis sian inaŭguran manifeston. La popolo konsternita pro la banka krizo aŭskultis el buŝo de la prezidento la faman citaĵon, ke "sola afero, kiun ni timu, estas la timo". La prezidento devontiĝis ekkomenci energian agadon, por diference de la pasiveco de la antaŭa respublika registaro moderigu la plej malbonajn sekvojn de la krizo kaj minacis, ke se la Kongreso ne estos preta rekoni necesajn aranĝojn, li ne hezitos, simile kiel en la tempo de la milito uzi esceptajn plenpovojn. Por la sekvinta tago estis kunvenigita la Kongreso, al kiu estis prezentita la unua escepta leĝo pri fermo de ĉiuj bankoj dum tempo de efektivigado de financa reformo, leĝo pri nuligo de ora standardo kaj pri devaluto de dolaro. La konsternita Kongreso balotis la leĝon preskaŭ sen debato dum la netuta horo. En la sekvinta tago kunvokis Roosevelt pres-konferencon, kiun li komencis per sciigo, ke venontfoje ĵurnalistoj ne devos antaŭmeti siajn demandojn skribe, kiel tio estis dum Hoover. Li klarigis al ĵurnalistoj la preparitajn disponojn, kaj ankoraŭ vespere aliris antaŭ mikrofonon, por ke en ĉi tiu unua el siaj fam-konataj "interparoloj ĉe fajrujo" populare kaj kompreneble klarigu al la popolo siajn paŝojn.

Tiel komenciĝis la famaj cent tagoj de la unua Roosevelta prezidenta periodo. Dum tri monatoj ratifis la obeema Kongreso aron da leĝoj, kiuj profunde reformis vivon en la lando. Ĉefa signo de ĉi tiuj reformoj estis intensa ŝtata interveno en la nacian ekonomion kaj provo pri la planado.

Iuj el Roosevelt-ekonomiaj socialaj kaj juraj reformoj jam de longe maturiĝis, en Eŭropo ili estis jam longe memkomprenebla afero kaj en Ameriko ili estis ĝis nun malebligataj nur pro agresemo kaj avidemo de granda kapitalo. En kelkaj kazoj temis pri eksperimentoj, kiuj parte ekfunkciis kaj fariĝis tiel nedividebla parto de la usona asocia sistemo. Aliaj nesukcesis kaj estis forlasitaj. Kelkaj estis malebligataj per fortoj de konservativismo kaj reakcio, kiuj rapide refortiĝis, denove levis la kapon kaj deklaris al "New Deal" batalon.

Reformoj de Roosevelt venis en momento, kiam la cikla krizo atingis la plej malsuperan punkton kaj la ekonomio komencis aŭtomate leviĝi el abismo, en kiun ĝi estis faligita per bankroto. La prezidentaj leĝoj la procedon de resaniĝo nur akcelis. Sed perfekte kuraci la kapitalismon kaj forigi ĉiujn kaŭzojn de estontaj krizoj, kiel pri tio revis kunlaborantoj de Roosevelt kompreneble oni ne sukcesis.

Roosevelt enkondukis kelkajn elementojn de planata ekonomio, precipe ŝtatan kontrolon de moncirkulado de moninstitutoj kaj bankoj, ŝtatan intervenon por helpi al etaj entreprenantoj kaj ŝtatajn garantiaĵojn kaj asekuron de etaj ŝparaĵoj en bankoj; kontrolon de agrokultura produktado, sistemon de ŝtata elaĉetado de superabundaj agrokulturaj produktoj, interezajn pruntojn al etfarmistoj, ŝtatan inspekton super protektado de grundo, arbaroj kaj de subtera riĉaĵo; ampleksan sistemon de publikaj laboroj, kiuj savis senlaborulojn antaŭ plej malbonaj sekvoj de krizo kaj ebligis plibonigon de la lando; publikajn laborojn por senlabora junularo kaj por senlaboraj kulturaj laborantoj, kio denove ebligis vastan prosperadon de kultura vivo; grandiozan programon de reguligo de riveroj kaj de konstruado de valbaraĵoj, kiuj ebligis ampleksan elektrigon de la lando, helpon al la malprogresintaj agrokulturo kaj industriigo de malprogresintaj regionoj kaj rompis senliman potencon de elektrejoj, ampleksan programon de sociala leĝaro, sistemon de kolektivaj kontraktoj, limigon de maksimuma labor-tago kaj difinon de minimuma salajro, limigon de laborhoroj ĉe virinoj kaj junularo, ŝtatan peradon en labor-konfliktoj, limigon de teroro flanke de labordonantoj en entreprenoj, sistemon de asekuro kaj de subtenoj dum senokupiteco.

Estas kompreneble, ke ĉio ĉi ne estis realigita dum kelkaj monatoj. Ĉi tiuj leĝoj kaj arangaĵoj estis epkondukataj laŭgrade dum la unuaj ok jaroj de regado de Roosevelt, fakte ĝis momento, kiam milito en Eŭropo devigis la prezidenton en intereso de milita prepariteco la programon de socialaj kaj ekonomiaj reformoj bremsi. Malgraŭ tio ili havis intensan influon je la usona socia sistemo. Unuan fojon en historio de Usono estis perbatalita rajto kaj devo de ŝtato interveni en ekonomiajn kaj socialajn cirkonstancojn, la unuan fojon ekis la ŝtato en rolo de socia ordigo, kies devo estas prizorgadi bonstaton de la tuta popolo kaj ne nur de unu privilegiita klaso. Rooseveltfaj socialaj reformoj havis grandegan influon je evoluo de laborista movado kaj faris el amerikaj sindikatoj daŭrajn kaj influajn faktorojn de la usona socia vivo.

New Deal ne estis planita, ĝisdetale antaŭe ellaborita progame. Ĝi estis senĉesa ĉeno de eksperimentoj kaj eraroj, de prosperintaj kaj ankaŭ de malsukcesintaj eksperimentoj. Ĝi ne rezultis el iu preta teorio, nur el nebula scio de morala devointerveni kontraŭ katastrofo kaj el la tradicia demokratia konvinko pri rajto de popolo je vivo inda je homo. Roosevelt ne havis iun teorion, kaj tute ne estis teoriulo. Sed li sciis elektadi kaj ĉirkaŭi sin per kunlaborantoj, kiuj difinitajn teoriojn havis.

Kvankam ŝajnas je la unua rigardo tre paradoksa, efikis tie antaŭ ĉio influo de socialismo, influo de Sovet Unio. La tempo de la plej granda ekonomia bankroto en la plej potenca kapitalisma lando estis samtempe tempo de la plej granda ekonomia prospero en Sovet Unio. La fakto de ekonomia ĥaoso en Usono, absoluta neaktiveco de la respublikana registaro kaj ĝia malkapablo interveni kontraŭ sekvoj de krizo, akre kontrastis kontraŭ la centrala planado en Sovet Unio, kiu starigis programon transformi la malprogresintan landon en la industrian grandpotencon. Pri tio, kio okazas en Sovet Unio estis la amerika publiko bone informita, parte dank' al kelkaj bonaj amerikaj ĵurnalistoj kaj parte konsekvence de parto-prenado de kelkaj usonaj firmoj je la soveta kvinjarplano. Kaj tiel la soveta kvinjarplano fariĝis por la usona publiko kaj por kelkaj politikaj funkciuloj kaj naci-ekonomiaj teorioj pruvo, ke estas eble en ekonomio centre plani. Unu el la unuaj agoj de Roosevelt-regado en sfero de ekster-landa politiko estis rekono de Sovet-Unio. Laŭ la prezidenta invito alveturis en novembro 1953 en Vaŝingtonon komisaro por eksterlando Maxim Litvinov kaj subskribis kun Roosevelt konvencion pri ligo de diplomataj rilatoj kaj konsul-konsenton. Malgraŭ tio, ke je Roosevelt estis farita premo, ke li ĉi tiun paŝon ne entreprenu, disvolviĝis de ĉi tiu tempo interrilatoj inter USA kaj SSSR harmonie kaj kulminis per alianco en la granda kontraŭfaŝisma koalicio.

Estas kompreneble, ke kune kun la penso de planado ne transprenis anoj de Rooseveltta cerb-trusto el Sovet-Unio ankaŭ penson de socialismo, do antaŭ ĉio naciigon de industrio. Ili male estis konvinkitaj, ke estos eble realigi la centralan planadon ankaŭ en kadro de sistemo de privata entreprenado. Tiel naskiĝis praktiko de ŝtata kapitalismo, kiu certe atingis grandan prosperadon en tempo de la milito, por poste jam resti la ĉefa karakterizo de la usona reĝimo.

Teorie devenis la eksperimentoj ligi la kapitalisman sistemon kun la planado el du fontoj: el teorioj de angla ekonomo John M. Keynes kaj el teorioj de la itala faŝista korporaciismo.

En jaroj 1933 - 1939, do ĝis tempo, kiam milito en Eŭropo praktike likvidis la sekvojn de krizo kaj malfermis novan periodon de granda prospero en Usono, estis el la federaj rimedoj uzite pli ol 20 miliardoj da dolaroj por la ŝtataj intervenoj en ekonomion laŭ senco Keynesaj teorioj. El tio estis uzite 12 miliardoj da dolaroj por realigo de publikaj laboroj.

Tuj kiam influo de Roosevelt-reformoj manifestiĝis per plibonigo de la ekonomia situacio, rilate okupitecon kaj mildigon de la ekonomia disfalo, rekonsciiĝis la grand-burĝaro el sveno, en kiun ĝi falis jam en la tempo, kiam la krizo kulminis, komenciĝis denove batali pri siaj privilegioj kaj rezisti furiozan reziston al ĉiuj pluaj eksperimentoj pri reformoj. Reakcio, kiu perdis ne nur kapon, sed ankaŭ la politikan povon, komencis klopodi pri firmigo de siaj pozicioj.

La usona popolo, kiu ankaŭ tiam ne distingiĝis per granda politika matureco aŭ per politikistaj ĉirkaŭrigardo, restis al sia honoro rilate ĉi tiujn provokadojn preskaŭ imuna. Kvankam pli granda parto de interkomunikaj rimedoj estis en manoj de la grand-burĝaro kaj daŭre kontraŭ Roosevelt atakis, tamen en ĉiuj elekto-kampanjoj 80 – 90 % de ĵurnaloj subtenis la opozician kandidaton, venkis Roosevelt en prezident-elektoj kvarfoje post si.

La prezidento ja ne intencis tion kandidati, ĉar ĉi tie estis tradicio de la unua prezidento Georgo Washington, ke la trian fojon neniu aspiras pri la prezidenta ofico. Kaj poste estis Roosevelt jam sufiĉe laca. Li revis pri tio, kiel li transloĝos en Hyde Parko kaj dediĉos sin al sia ŝatata filatelio kaj kiel fondos en Hyde Parko bibliotekon, en kiun li transdonos sian prezidentan arkivon. Sed en Eŭropo furiozis milito kaj Usono ne povis permesi al si transdoni la povon al nova homo, tute ne sperta en problemoj de eksterlanda politiko. Tial plimultiĝis la voĉoj, ke la prezidento restu en la ofico; ĉar eĉ nuran lian foriron la faŝistaj diktatoroj Hitler kaj Musolini konsiderus sian venkon, ĉar Roosevelt sin eĉ se nur en deklaroj kaj mesaĝoj, jam tro partoprenis batalon kontraŭ faŝismo.

Nur la plej proksimaj amikoj sciis, ke li akcentos la kandidatecon, se li estos per kongreso unuanime kaj sen antaŭa prepara kampanjo elektita. Tio okazis dum la kongreso de la demokratia partio en julio 1940 kaj Roosevelt atingis, ke lia anstataŭulo estis elektita Wallace. Por la respublikana partio kandidatis Wendel Wilkie, por kiu agitis 90 % de usona preso, tamen Roosevelt estis elektita per majoritato de 27 milionoj kontraŭ 22 milionoj la trian fojon.

Estas interese, ke Wilkie pli poste montriĝis kiel unu el la plej fervoraj Roosevelt-anoj kaj energia defendanto de lia eksterlanda politiko. Eĉ en la jaro 1944 li traktis kun Roosevelt pri la reformo de la politika vivo. La sudaj demokratoj kaj la dekstrumo devis esti el la demokratia partio eksigitaj kaj Wilkie devis kuniĝi kun tuta respublikana maldekstrumo kun Roosevelt-demokratoj, por ke tiel estiĝu du programe diferencaj partioj, konservatia kaj liberala. Antaŭtempa morto de Eilkie aŭtune 1944 ĉi tiujn planojn malebligis.

Roosevelt komprenis la trian elekton kiel mandaton al energia agado kaj komencis kampanjon por leĝo pri "prunto kaj ludono", kiu devis ŝanĝi Usonon en "arsenalon de demokratioj" kaj garantii liveradon de usonaj armiloj al landoj batalantaj kontraŭ naziismo kaj faŝismo. Ĉar Roosevelt konsciiĝis, kian signifon havas usonaj armiloj por venko super naziismo, li venigis al direktado de ĉi tiu "arsenalo" homojn, "kiuj la fabrikadon produktadon komprenis", – kapitalistojn. Per tio ja estis atingita en la arm-tekniko ne estinta progreso, sed la monopoloj denove akiris perditajn poziciojn.

Kiam Germanoj ekatakis Sovet-Union, promesis Franklin Roosevelt en radia disaŭdigo al Sovet-Unio ĉian helpon de Usono kaj efektite baldaŭ per dekreto li plivastigis aktivecon de leĝo pri prunto kaj ludono (luo) ankaŭ je Sovet-Unio. Al tio estis en Usono necesa vere granda kuraĝo. Ĉi tiun kuraĝon Roosevelt konfirmis per tio, ke laŭ lia komisiono Harry Hopkins komencis la unuan rilaton sur la plej alta nivelo inter tri registaroj de estonta kontraŭfaŝista koalicio.

La plej alta vivcelo de Churchill baziĝis en konservo de brita imperio. Per ĉi tiu celo direktiĝis liaj militaj kaj politikaj planoj; solvo de senperaj demandoj milita taktiko kaj gravegaj konsideroj pri la postmilita ordigo. Li konsciiĝis, ke al Granda Britio minacas pordo de la iama privilegiita pozicio sur maroj kaj tial rezistis kiun ajn militan planon, kiuj postulas de Anglio tre grandajn oferojn. Kiam la evoluo pruvis, ke Sovet-Unio eliros el la milito venke, li preparis plej diversajn planojn, kiel sekurigi, ke ĉi tiu venkinto ne tro influu evoluon en Eŭropo, ke la Ruĝa armeo avanci kiel eble plej malmulte okcidenten de soveta limo. Per ĉiuj rimedoj li spitis ĉiujn proponojn, kiuj kuraĝigus la koloniajn naciojn al batalo por sendependeco kaj endanĝerigus la britan imperion.

Roosevelt alvenadis al ĉi tiuj konferencoj kun aliaj planoj, kun alia historia sperto, kun aliaj opinioj kaj planoj. Temis al li pri la malvenko de Germanio, sed li ne certigis al si de tio la malantaŭan pordeton. Rapida kaj venka finiĝo de la milito estis al li super ĉio kaj Usono tiam havis aliajn apartajn interesojn nek en la okcidenta kaj centra Eŭropo, nek en la proksima Oriento aŭ en Afriko. La heroeca rezisto de la soveta popolo kontraŭ naziistoj paralizis iaman kontraŭsovetan malkonfidon kaj kalumniojn kaj ekvokis simpatiojn kaj amikecon al la rusa popolo. Roosevelt ne timis kreskon de influo de Sovet-Unio en la postmilita Eŭropo, eĉ kontraŭe bonvenigis ĝin. Je la dua flanko tradicia rezisto de la usona publika opinio kontraŭ koloniismo kaj konkurencaj interesoj de la usona ekonomio kondukis Roosevelton al sinteno kontraŭ la brita imperiismo. Kiam montriĝis, ke Angloj postula sur Usono el la nomo de alianco helpon kaj subtenon en la batalo kontraŭ liberula movado de hinda popolo, Roosevelt tion katagorie rifuzadis. Ĝuste tiel la konferencoj en Teheran kaj Jalta fariĝis Roosevelt la peranto inter britaj kaj sovetaj reprezentantoj,

inter ili venadis en multnombraj demandoj al konfliktoj. "Atlantika alianco", kiu estiĝis post la milito kiel alianco kun speciale kontraŭ-soveta imperialisma intenco, estis laboro de Churchill kaj laboro de Roosevelt-sekvantoj post lia morto,

Dimanĉe la 7-an de decembro 1941 Japanoj detruis per neatendita atako sur Pearl Harbor la usonan milit-flotilon en Pacifiko kaj kelkajn tagojn pli poste ankaŭ Hitler kaj Musolini proklamis militon al Usono. Roosevelt devis fari gravan kaj historie fatalan decidon, kiu el la du frontoj, ĉu eŭropa kaj la pacifika estas pli gravaj. Estis unu el plej grandaj Roosevelt venkoj, ke kontraŭ la usona dekstrumo sciis konvinki usonan popolon, ke ĝi devas ĝuste antaŭ ĉio fini kun la germana naziismo.

Principoj de la nova strategio estis ellaboritaj fine de decembro 1941, kiam en Vaŝingtonon alveturis Winston Churchill kaj kelkajn konferencojn partoprenis ankaŭ ambasadoro Litvinov por Sovet-Unio. En unuaj monatoj en la jaro 1942 estis situacio por aliancanoj konstante malespera. Sed ankaŭ pli poste, kiam venis militaj sukcesoj, oni ne alvenadis en ĉiuj demandoj al absoluta harmonio. Eble ĉi tiun problemon esprimis prezidento plej bone en unu interparolo kun sia filo Elliott, kiam li al li diris: "Militoj estas necertaj aferoj. Por ke ni venku, ni devas konservi ĝenajn aliancanojn, unu el la aliancanoj subteni, dume la alian lasas sinki. Ni lasu nin devigi al strategia kompromiso, kiu certe ofendos Rusojn, por ke ni estu kapablaj pli poste akceptigi kompromison, kiu certe ne estus agrabla por Angloj. Unueco, kiun ni formis por la milito estas nenio kontraŭ unueco, kiun ni devos konstrui por la paco. Post milito, signifas, kiam aŭdiĝos kriado, ke la unueco jam ne plu estas bezonata. Nur post tio komencos nia laboro, kaj plej serioza laboro".

Teherana konferenco montris, ke la paca kunlaboro la Granda Britio post la proksimiĝanta venko estas ebla, en novembraj balotoj en jaro 1944 Roosevelt la kvaran fojon elektita prezidento. Jalta konferenco elvokis ondon de entuziasmo en Usono kaj tial Roosevelt prave kredis, ke li sukcesos pacan elkonstruadon de la mondo realigi. Li havis antaŭ si ankoraŭ kvar jarojn de regado kaj supozis, ke en ĉi tiu tempo sufiĉos certigi al si bonan sekvanon, kiu post lia foriro al ripozo daŭrigas lian laboraĵon. Li pensis, ke dum tiu tempo sufiĉos fari tion, kion li devis interrompi en tempo de la milito: Unue plue daŭrigi en laboro de socialaj reformoj, nun certe jam ne en kondiĉoj de kriza bankroto, sed dum daŭranta milita prospero kaj sur senmezure plifortigita ŝtata direktado de ekonomio. Kaj due: atingi ankaŭ politikan reformon en Usono, nome fini kun malmoderna kaj arkaika partia organizaĵo kaj krei grandan progreseman demokratian partion fonditan ne laŭ tradiciaj regionaj aŭ grupaj interesoj, sed unuiganta reale ĉion, kio estas en la usonan nacio progresema kaj apogas sin antaŭ ĉio pri laboristaj kaj farmistaj tavoloj.

Estis al li klare, ke lin en ĉi tiuj jaroj atendas granda laboro. Antaŭ ĉio konvinki la usonan popolon, edukadi kaj instrui ĝin. Kaj ke kun tio li devas komenci tuj, propre dajrigi en la granda edukada laboro, kiun li komencis jam antaŭ 12 jaroj.

En la lasta marta semajno li forveturis ferii en Warm Springs. Li kunprenis kun si nur du kozinojn — maljunajn sinjorinojn, ĉe ili estis certeco, ke lin ili ne turmentos per politikaj debatoj kaj garantios al li sufiĉe da tempo por la pensado. Antaŭtagmeze la 12-an de aprilo li sidis ĉe skribotablo kaj laboris super definitiva teksto de manifesto, kiun li estis prezentonta la sekvantan tagon antaŭ radia mikrofono okaze de solenoj de naskiĝ-tago de Thomas Jefferson kaj volis en ĝi atentigi la popolon pri problemo de konstruado de daŭra kaj justa paco. Ĉe liaj piedoj kiel kutime sidis hundo Fala. En angulo de la laborejo silente trikis ambaŭ maljunaj sinjorinoj. En la ĉambro estis pentristino, Usonanino de rusa deveno, kiu petakiris permeson pentri la prezidentan portreton kaj laboris ĉi tie kondiĉe, ke ŝi ne ĝenos. Subite la prezidento demetis plumon, ekĝemis kaj diris: "doloras min terurege la kapo"! Post momento li falis en senkonsciecon. Alvokita loka kuracisto ordonis, ke oni lin transportu en la liton kaj konstatis atakon de encefala apopleksio. Poste li tuj kuniĝis telefone kun prezidenta persona kuracisto doktoro Mac Intyre en Vaŝingtono. Tiu donis necesajn instrukciojn kaj donis informon al sinjorino Roosevelt.

Tri minutojn antaŭ la sesa horo posttagmeze interrompis ĉiuj usonaj stacioj la elsendadon, por anonci al la popolo kaj al la mondo funebran sciigon. Ankoraŭ neniam estis iu diplomato tiel priplorita en la tuta mondo, kiel tiam la 12-an de aprilo 1945 prezidento de Usono Franklin Delano Roosevelt.

Prelegon pri F. D. Roosevelt prezentis en nia klubo Josef Štefan (mortis 1968) la 18-an de aprilo 1967 (unua parto) kaj la 23-an de majo 1967 (dua parto). La teksto estis trovita en la kluba arkivo sen nomo de aŭtoro, sed estas verŝajne, ke ĝi estas la sama teksto, kiun preparis de la preleginto.